

Theodor Storm,

La urbo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza mar'
Situas la urbeto;
Nebulas sur la tegmentar',
La monotona bru de l' mar'
Aŭdiĝas tra l' kvieto.

Arbar' ne estas tie ĉi,
Ne kantas bird' sen ĉeso;
Anseroj nur, kun dura kri',
Forflugas alte preter ĝi,
Ĉe l' strando flirtas greso.

Sed pendas mia kor' de vi,
Vi griza urb' ĉe-mara;
De la juneco sorĉ-graci'
Ridante kuŝas super vi,
Vi griza urbo kara.

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-03.*

Arg-173-346 (2004-02-22 12:54:29)